

Leterkesto, 5-a parto : SAT-kongresoj en Augsburg kaj Nigra Arbaro
Claude Gacond, 372-a radioprelego, 1970.11.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Restas en nia leterkesto kelkaj leteroj kaj poŝtkartoj, pro tio ni daŭrigas ankoraŭ hodiaŭ nian babiladon kun niaj radio-geaŭdantoj. Ni jam salutis niajn radio-amikojn en Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando kaj Francio.

A.- El Okcidenta Germanio salutis sinjoro Gerhard Kunze en Halden, gesinjoroj Alwin kaj Silvia Sommer, kiuj ĉeestis la SAT-kongreson, kiu okazis en Augsburg, d-ro Klaus Schlüter en Burgdorf kaj sinjoro Walter Kaukal en Neustadt-Weinstrasse.

Cl.- El Orienta Germanio salutis sinjoro Ernst Mutschall en Halle kaj sinjoro Franz Tischer en Magdeburg. El Hungario skribis sinjoro Pal Balkanyi en Budapeŝto kaj sinjoro Georgo Csüllög en Vésztő.

A.- El Italio sinjoro Umberto Stoppoloni en Pistoia skribis por diri sian intereson pri la libro de Edmond Privat: *Interpopola Konduto*. Li deziras scii, kie oni povas aĉeti tiun libron.

Cl.- La Amikoj de Edmond Privat ekrilatis kun eldonistoj por povi ĝin reeldoni, sed ĝis nun ili ne havis sukceson.

A.- Tamen ni scias, ke tiu libro havus multajn aĉetantojn. Okaze de prelegoj pri la vivo kaj penso de Edmond Privat la aŭdantaro estas ĉiam tre interesata pri tiu verko *Interpopola Konduto*, kaj ĉiam bedaŭras ne povi akiri tiun libron.

Cl.- Ekde la venonta semajno dum serio da prelegoj ni legos al vi erojn el tiu ege aktuala verko. Per ĝi vi refoje konsciiĝos, ke la penso de Edmond Privat povos nutri multajn lecionojn, kiam la esperanto-literaturo estos instruata en la gimnazioj.

A.- El Jugoslavio salutis sinjoro France Marn en Ljubljana.

Cl.- El Nederlando sinjoro L.- H. Brans en Veyhel, kiu ricevis ekzemplerojn de la gazeto *Svisa Espero*, diras pri nia svisa revueto : « *La gazeto ne estas ampleksa, sed faras bonan impreson pro viveca kaj facila lingvo.* »

A.- Al ĉiuj geaŭdantoj, kiuj petos specimenajn numerojn de nia svisa esperanto-organo, ni sendigos tri numerojn de *Svisa Espero*. Tiel vi povos havi ideon pri la esperanto-vivo en Svislando.

Cl.- Ĉiam el Nederlando skribis sinjoro Gerard van der Horst en Hago. Li raportas pri du esperanto-kongresoj. Li ĉeestis la 43-an kongreson de SAT en Augsburg kaj la renkontiĝon en Arbaro Nigra. Jen sciigoj pri tiuj manifestacioj laŭ liaj informoj :

A.- « *Al la 43-a SAT-Kongreso aliĝis 401 esperantistoj ; efektive partoprenis 360 gesamideanoj el 21 landoj. De ekster Eŭropo venis gekamaradoj el Egiptio, Israelo, Japanio, Kanado, Kanariaj Insuloj kaj Usono.*

Cl.- *La solena malfermo okazis en la Aŭgsburga Urbodomo. Reprezentantoj de la Bavara registaro, de la urbestro, de sindikatoj kaj de multaj Esperanto-organizaĵoj salutis la kongreson. Fervojista arĉ-orkestro ornamis la solenaĵojn. La prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, d-ro Werner Bormann, malfermis tutsemajnan esperanto-ekspozicion en tiu urbodomo.*

A.- *Posttagmeze la prezidanto de UEA, profesoro Ivo Lapenna, prelegis en la Aŭgustana salonego pri la temo « Aspektoj de la lingva diskriminacio. » Post tio sekvis altnivela kultura programo de muziko kaj kantoj.*

Leterkesto, 5-a parto : SAT-kongresoj en Augsburg kaj Nigra Arbaro
Claude Gacond, 372-a radioprelego, 1970.11.25 & 28

Cl.- *Vespere la ĉefurbestro akceptis la landajn reprezentantojn.*

A.- *Dum tiu kongresa semajno okazis 4 laborkunsidoj. En la kadro de la Laborista Universitato prelegis d-ro Bormann pri la temo « Prognozo pri la ekonomia situacio post 25 jaroj »; sinjoro Gerhard Kunze parolis pri Bertold Brecht; profesoro Gaston Waringhien rakontis, kiel ekestis la **Plena Ilustrita Vortaro**, sinjoro Mark Starr prelegis pri « Obstakloj kontraŭ esperanto inter laboristaj sindikatoj »; profesoro Paul Neergard pri « La verda revolucio, ebla savo de la homaro; sinjoro Walter Poppeck pri « La sindikatoj en Germanio » kaj sinjoro Nikolaj Rytjkov recitis el la verkoj de la rusa verkisto Solĵenicin.*

Cl.- *Okazis diversaj frakcikonvenoj, distraj programoj, vizitoj de fabrikoj, ekskursoj, teatra vespero. La infanoj havis propran kongreseton.*

A.- *La germana federacio kanceliero Willy Brandt telegrame salutis tiun kongreson.*

Cl.- *Venontjare la 44-a kongreso de SAT okazos en Parizo de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto.*

A.- *La postkongreso okazinta en Arbaro Nigra grupigis 110 gesamideanojn el 11 landoj. Ne ĉiuj partoprenantoj povis loĝi en la naturamika domo de la vilaĝo Kniebis. Duono de la ĉeestantoj ricevis tranoktejon en privataj domoj. Tiel la vilaĝanoj konsciis pri la valoro de esperanto.*

Cl.- *Tiu postkongreso estis ĉefe dediĉita al ekskursoj kaj migrado en la naturo. »*

A.- *El Norvegio skribis sinjoro Otto Prytz en Oslo. Jen ero el lia letero :*

Cl.- *« Antaŭ kelka tempo vi per radio respondis al leteroj de la aŭskultantoj. Samtempe vi faris al ni du demandojn : Ĉu ekzistas aŭskultantoj de viaj programoj en aliaj landoj ol tiuj menciitaj de vi, kaj ĉu ekzistas blindaj aŭskultantoj. Mi povas jese respondi al ambaŭ demandoj, ĉar mi estas blinda norvego. »*

A.- *En tiu letero sinjoro Otto Prytz ankoraŭ skribas :*

Cl.- *« Mirigis min, ke Hector Hodler jam antaŭ la unua mondmilito tiel trafe povis priskribi la tipan laborulon de nia movado. Laŭ mia opinio nun necesas, ke la esperantistoj kaj private kaj kiel organizaĵo eniru en la socian vivon, kaj ne nur postulu, ke la aliaj homoj iru al la esperantistoj. »*

A.- *El Pollando sinjoro Jerzy Banacki en Tomaszow skribis por diri sian interesiĝon pri la programita instruado. Li faras interesan rimarkon :*

Cl.- *« Domaĝe, ke vi ne antaŭdiras venontajn disaŭdigajn temojn. »*

A.- *Ni provos de nun vin kontentigi tiurilate, anoncante la temon de la venonta prelego.*

Cl.- *El Svedio skribis sinjoro Lennart Aberg en Gotenburg. Li tiam kuŝis en hospitalo por prizorgi sian ne tre sanan koron. Ni esperas, ke tiu prizorgado plensukcesis.*

A.- *Fine ni deziras saluti en Svislando sinjoron Ernst Glättli en Brugg, sinjoron Hans Kästli en Wil kaj gesinjorojn Karl-Heinz kaj Anni Mischler en Zürich.*

Cl.- *En la venonta semajno kaj dum pluraj elsendoj ni legos al vi erojn el la libro de Edmond Privat : **Interpopola Konduto**.*

A.- *Kaj nun ni atendas la leterojn kaj poŝtkartojn de niaj geaŭdantoj.*

Leterkesto, 5-a parto : SAT-kongresoj en Augsburg kaj Nigra Arbaro
Claude Gacond, 372-a radioprelego, 1970.11.25 & 28

Cl.- Vi aŭdis babiladon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis
reaŭdo !

-oOo-